
*Numero 7a • Januaro 2026*

# KONGA STELO

## Nyota ya Kongo

*Trimonata informilo de DKEJO (Demokratia Kongolanda Esperantista Junulara Organizo) kunlabore kun aliaj kongolandaj organizoj.*



## Enhavo

***Front-paĝe :***
Lernantoj pri informadiko
(Etimarki Pamoja Hakuna Matata)

Redakcie ........................................1
Etimarki ........................................2
Etimarki..., Raporto ........................4
Rondo Esperantista de Kiwanja......7
UIKA ........................................ 8
Timo, Literatura E-Konkurso.........10
Z-tago, poemo pri morto ...............11
Z-tago en Rutshuru ........................12
Mia vizito al Ĉeĥio .........................13
Averto al esperantistinoj ..............15
Pri la muzikisto Chris Freddy .......16
Solidareco milittempe ................. 17
Lingvoj en DR Kongo ................... 18
Leciono pri la Sŭahila ...................19

***Dors-paĝe :*** Esperanto, al nia lingvo

## Redakcie
## Joel Muhire



Saluton karaj!

Feliĉan novjaron 2026 !

La tagoj impetas sagorapide kaj jen, denove novjariĝis, jen denove nova numero por vi ! La jaro 2025 plenis je militaj turmentoj en la orientkongaj provincoj Norda kaj Suda Kivuoj, bedaŭrinde ankoraŭ tondras armilaro en tiuj provincoj. Tiu malfacila situacio igas lampaŝi de pluraj jaroj la orientkonga movado, tamen kuraĝaj instruistoj daŭre zorgas pri kluboj, reta instruado de Esperanto,… Kuraĝon al ili !

Ĉi-numere, ni legas raportojn pri e-agadoj de la asocioj *Etimarki Pamoja Hakuna Matata* kaj *Universal Infinity Knowlodge Association (UIKA)*, s-ro Justin raportas pri *Rondo Esperantista de Kiwanja (REK)*. Vi legos ankaŭ pri *Internacia Literatura E-Konkurso "Hristo Gorov-Hrima"*, Prime Nsabimana parolas al ni pri *Timo*, Kokou SAGBADJELOU el Togolando parolas al ni pri sia *vizito en Ĉeĥio*, dum la kongresa semajno. Vi ekscios ankaŭ pri la naciaj kaj oficiala lingvoj de DR Kongo ĉe la paĝo 18. *Kio estas Esperanto ?* Legu dorspaĝe la priskribon de UEA. Kiel kutime, ni prezentas parton de nova leciono pri la sŭahila, ĝuu ellernadon de tiun lingvo pere de nia revuo Konga Stelo.

Ni dankas ĉiujn niajn kunlaborantojn kaj legantojn!

**Konga Espero (KS)** estas trimonata informilo de DKEJO *(Demokratia Kongolanda Esperantista Junulara Organizo)* eldonata kunlabore kun aliaj kongolandaj organizoj.

**Redaktoro:** Joel Muhire
**Kontaktoj:** *joelmuhire0@gmail.com, Tel. +243 977 643 030*

**La estraro de DKEJO (2025-2028)**
**Prezidanto :** Waziwazi Grâce,
*Tel. +243 976 413 837, rete: dkejo@outlook.com.*
**Vicprezidanto :** Ramazani Nanjira, Tel. *+243 981 137 264*
**Sekretario :** Jofina Mungosy, *Tel. +243 979 051 901*
**Kasisto :** Ornella Idumba, *Tel. +243 970 702 532*
**Konsilanto:** Carine Idumba, *Tel. +243 893 174 046*

### Kiel sendi kontribuaĵojn al *Konga Stelo?*

- ✓ Prefere sendu tekston originale verkitan en Esperanto kun foto/bildo memfarita.
- ✓ Se vi sendas tradukaĵon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Pri fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi.
- ✓ Fotoj devas esti bonkvalitaj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ Bonvolu sendi vian artikolon rete kiel kutiman retmesaĝon aŭ en format RTF al: *joelmuhire0@gmail.com* plej laste, je la fino de ĉiu tria monato.
- ✓ Viaj kontribuoj povas temi pri e-agado en via loĝregiono, poemoj, kulturo (manĝaĵo, vivmaniero, bredado, transporto, ktp), naturo, rakontoj, humuraĵoj, lingvoj, ktp.

**Koran antaŭdankon pro via kontribuo!**

***DKEA:*** *Demokratia Kongolanda Esperanto Asocio, fondita en 1963.*
***DKEJO :*** *Demokratia Kongolanda Junulara Organizo, fondita en 1984.*
***ILEI:*** *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.* www.ilei.info.

-----------------------------------------

Bonvolu subteni la redaktoran laboron monsendante al la FEL-konto : **oelm-x**.
*FEL- Flandra Esperanto-Ligo*

# ETIMARKI PAMOJA HAKUNA MATATA

## Agadperiodo 2025–2026



**Marcelin Luheka – Goma**

## Ekstraordinara raporto pri niaj senpagaj trejnadoj

Nia asocio ETIMARKI PAMOJA HAKUNA MATATA, motivita de granda espero kaj profunda amo al la junularo de nia regiono, lanĉis tute senpagajn trejnadojn pri informadiko kaj Esperanto. Tiu iniciato celas ne nur instrui, sed ŝanĝi la vivon de gejunuloj, kiuj loĝas en regionoj markitaj de la milito, la malriĉeco kaj la manko de ŝancoj.

En niaj malpacaj regionoj, plejmulto de la junuloj ne plu studas pro malfacila vivsituacio, ili ne plu povas perlabori monon per kiu vivteni sin, kaj do ofte estas devigataj fari tre malfacilajn elektojn inter aliajn:

• aŭ oni fariĝas danĝera persono por la popolo, sen direkto kaj sen estonteco.

• aŭ oni integras armeajn grupojn, kun ĉiuj riskoj kaj tragedioj kiuj sekvas.

En nia asocio ETIMARKI PAMOJA HAKUNA MATATA ni multefoje faras kampanjojn por montri al junuloj, ke ekzistas aliaj solvoj pli bonaj, pli dignaj, pli homaj. Ni interesas ilin lerni metiojn, por ke ili fariĝu bonaj, sendependaj, respondecaj civitanoj. Pro tio ni iras en diversajn mezlernejojn kaj multajn lokojn, kie junuloj ofte troviĝas. Tie iliaj reagoj kortuŝas nin profunde. Ili diras al : *“Ni povas havi la revojn lerni metiojn... sed kie ni trovos monon por pagi la instruistojn en la trejnadcentroj? Se al ni mankas mono eĉ por aĉeti manĝaĵojn, kiel ni povos pagi por eklerni?”*

Ni vivas en regiono, kie la gejunuloj volas ŝanĝi sian vivon, sed neniu laboro troveblas kaj edukado fariĝis neatingebla luksaĵo por multaj. Tial ni sentas nian respondecon interveni hodiaŭ, ĉar morgaŭ estos tro malfrue.

## Niaj Senpagaj Trejnadoj — Espero por nova vivo

Nia asocio planas organizi trejnadojn de diversaj metioj por gejunuloj tute senpage: *kudrado, pentrado, masonaĵo, ŝminkado, informadiko, instruado de Esperanto, la germana, la angla, la hispana, la francan (fremdaj lingvoj)* kaj aliaj kapabloj kiuj povas savifari ilian estontecon.

Nia devo estos pagi la instruistojn kaj ĉiu junulo lernos senpage kaj poste ricevos atestilon — dokumenton kiu malfermos pordon al laboro.

## Informadiko kaj Esperanto

Ni jam lanĉis la trejnadon pri informadiko kaj Esperanto, kiuj nun estas ebla danke al la fonduso *“Kuri por Kongo”*, organizita ankaŭ dum la 81a IJK en Indonezio, per kiu nia asocio akiris 4 porteblajn komputilojn.

Krome, la membroj-volontuloj de nia asocio, studintaj informadikon en la universitatoj, konsentis instrui senpage. Vi ne povas imagi la efikon: Ni lanĉis la senpagan trejnadon kaj multaj homoj aliĝis tiom ke ni devis limigi la nombron. Ni estis devigitaj organizi du klasojn: Matenan klason, posttagmezan klason.



En ĉiu klaso venis tro multaj junuloj, do ni ankoraŭ devis redukti la nombron. Por ke la lernado funkciu, ni prunteprenis 4 pliajn komputilojn de amikoj. Inter la 68 aliĝintoj, nur 23 povis esti akceptitaj en informadiko.

Tamen, estas ankoraŭ dekoj da aliaj, kiuj atendas sian vicon kaj petas al ni: *“Bonvolu ne forlasi nin...”*

Pri Esperanto, 21 junuloj jam lernas kun granda intereso. Se vi volas scii multon pri tiuj trejnadoj, ne hezitu kontakti nin — niaj pordoj estas ĉiam malfermaj. Ni havas ankaŭ videan raporton kiu klare montras la intereson de gelernantoj, kaj kiel statas la aferoj.

## Humanistara paŝo — Pli ol vortoj

Intertempe, mi ĝojas informi vin, ke la Asocio ETIMARKI PAMOJA HAKUNA MATATA ĵus faris grandegan humanan paŝon de nia agadperiodo 2025–2026. Ni subtenis pli ol 50 familiojn vivantajn en ekstrema malfacilo pro la senhalta krizo en Goma kaj ĝia ĉirkaŭa regiono.

Legu raporton pri tio en la sekvanta artikolo !

# ETIMARKI PAMOJA HAKUNA MATATA RAPORTO

**Marcelin Luheka – Goma**




## Enkonduko

La 16-a de novembro 2025 fariĝis unu el la plej memorindaj kaj signifoplenaj tagoj por nia asocio ETIMARKI PAMOJA HAKUNA MATATA. Tiu tago markis la unuan grandan humanitaran paŝon de nia nova agad-periodo 2025–2026.

Ni, grupo de 31 gejunuloj kun pura koro, klara vizio kaj komuna volo konstrui pacon, faris grandegan penon por atingi unu celon: helpi 50 familiojn vivantajn en ekstrema malfacilo pro la senhalta krizo en Goma kaj ĝia ĉirkaŭa regiono.

Ni ne nur sukcesis — ni superis la atendojn, ĉar danke al malaltiĝo de la prezoj dum la aĉetado ni povis eĉ plialtigi la nombron de familioj atingindaj.

La rakontoj kiujn ni aŭdis, la larmoj kiujn ni vidis kaj la dankesprimoj kiujn ni ricevis, profunde tuŝis la koron de nia tuta teamo. Ĉi tiu raporto celas prezenti klare, honeste kaj travideble ĉion, kion ni faris, vidis kaj travivis dum tiu tago.

La urbo Goma kaj la tuta orienta parto de DR Kongo troviĝas en konstanta stato de maltrankvilo. Laŭvorte neniu tago pasas sen armilaj bruoj, fuĝoj, vivoperdoj...

Jen kelkaj faktoj, kiuj instigis nin efektivigi la projekton:

De monatoj, dek miloj da homoj estis devigitaj forlasi siajn hejmojn. Centoj troviĝas en kampadejoj sen protekto, sen manĝaĵoj, sen medikamentoj... Familioj manĝas oftege unufoje tage; kelkfoje eĉ tute nenion. Gepatroj perdas laborojn, infanoj perdas lernejojn, kaj maljunuloj perdas ĉian subtenon. Tia kunteksto instigis nin realigi projekton, kiu celas ne nur nutri ventrojn, sed ankaŭ levi la animon, revenigi dignon kaj restarigi esperon.

## Celo de la Projekto

La oficiala titolo de nia unua agado por la jaro 2025-2026 estis: *“Subteno al 50 Familioj en Ekstrema Malfacilo pro la Krizo en Goma.”*

La celoj estis klaraj: Havigi vivsavajn manĝaĵojn al la plej afliktitaj familioj. Selekti

tiujn, kiuj absolute ne plu havis eblon certigi sian ĉiutagan nutradon. Transdoni manĝpakaĵojn konsistantajn el 1 sako da maiza faruno, 1 sako da rizo, 5 litroj de kuira oleo. Subteni ankaŭ niajn proprajn membrojn, kiuj mem estas viktimoj de la krizo. La tuta iniciato estis konstruita por montri ke paco komenciĝas ankaŭ per unu telero da manĝaĵo kaj unu mano etendita al frato en bezono.

## Jen Pozitiva surprizo — reduktitaj prezoj

Dum aĉetado de la nutraĵoj ĉe lokaj vendejoj (por subteni la lokan ekonomion), ni ricevis reduktitan prezon. Tio permesis al ni atingi plian nombron da familioj, superante la komencan celon. Tiu neatendita favoro donis al ni fortan senton, ke nia laboro estas benata kaj subtenata ankaŭ per la providenco.

Nia tuta teamo konsistis el 31 personoj. La plej aĝa volontulo havis 28 jarojn kaj la plej juna nur 14 jarojn. Tiuj junuloj montris disciplinon, respektemon, ordemon, korpuran prezenton kaj klaran deziron fari la mondon pli bona.

En multaj hejmoj la familioj diris: *"Tiaj junuloj estas maloftaj.", " Vi estas benitaj, puraj, edukitaj, kaj viaj celoj estas bonaj. Ni fieras vidi vin."*

Aliaj diris: *"Bonvolu akcepti niajn infanojn en vian grupon. Ni volas, ke ili lernu la valorojn, kiujn vi montras."* Tio montras la moralon, la respekton kaj la inspiron, kiujn nia teamo alportas al la socio.

La plej grava parto de nia agado ne estis nur distribuado, sed ankaŭ intervjuoj faritaj en ĉiu hejmo. Ni demandis pri: la nuna vivkondiĉo, la sanstato de la infanoj, la fontoj de enspezoj, la timoj kaj problemoj. Ni aŭdis terurajn historiojn en preskaŭ ĉiuj hejmoj...

La plimulto de infanoj el multaj familioj ne plu frekventas lernejon pro manko de mono. Multaj familianoj ne manĝas regule, pli ofte nur unufoje tage. Multaj maljunuloj havas urĝajn sanproblemojn sed neniujn medikamentojn. Kelkaj patrinoj vivas kun edzoj kiuj drinkas troe, lasante ĉiajn respondecojn al siaj edzinoj. Unu patrino havas edzon kiu ne plu povas leviĝi el la lito pro manko de kuraciloj; li estas tiel malsana, ke li preskaŭ neniam videblas de najbaroj. Ni eniris domojn kie ne troviĝas eĉ unu seĝo, domojn kun krevoj en la muroj, domojn kie infanoj dormas sur preskaŭ nuda tero. La alia plej kortuŝa vizito estas al la 89-jara avino sola, forgesita, sed forte teniĝanta. Ŝi estas la plej aĝa ricevinto de nia subteno. Ŝi vivas tute sola en tre eta dometo kies "saloneto" mezuras nur 1 metron larĝe kaj 1,5 metrojn longe. En la dometo ne troviĝis seĝoj, ne troviĝis lito, ne troviĝis iu objekto krom unu poto. Kiam ŝi vidis nin, ŝi ekploris kaj diris: *"Miaj infanoj... Mi jam pensis, ke mi mortos forgesita. Sed hodiaŭ mi vidas, ke Dio ne forgesas. Vi estas la espero, kiun la mondo bezonas."* Ĉiu el niaj volontuloj silentis pro emocio.

La virino FEZA, kiu malfermis sian koron kaj dividis kun ni parton de sia eksterordinara vivo. Si parolis pri la malfacilaĵoj, kiuj trafis ŝin, kaj pri sia patro, kiu estas treege malsana kaj kiun ŝi mem zorgeme nutras kaj subtenas ĉiutage. Krom tio, ŝi konfidis al ni aliajn tre intimajn travivaĵojn, kiuj profunde tuŝis nin.

## La voĉoj de la vidvinoj



Unu vidvino BLINDA diris: *"Mi ne plu havas forton labori. Sed vi redonis al mi spuron de espero."* Alia vidvino, tre malforta, plorante diris:

*"Mi estas ĉio en mia familio. Sed ofte mi ne scias kion doni al la infanoj. Hodiaŭ vi savis nin."*

**La ĝojo de la familioj**

Multaj diris: *"Vi venis ĝuste en la ĝusta tago. Hodiaŭ ni ne havis manĝaĵon."* Iuj aliaj diris : *"Vi venas kiel lumeto en malluma tempo."* Iu alia patrino diris : *"Ne forgesu nin. Bonvolu reveni."*
Ĉi tiuj vortoj donis al ni kuraĝon daŭrigi niajn agadojn kun pli granda decidemo.

**Kion la familioj proponis al ni fari por la estonteco ?**

Al Ĉiuj familioj ni demandis: *"Kian projekton vi ŝatus, ke nia asocio faru en la estonteco?* La respondoj estis tre interesaj kaj profundaj.
Jen iliaj proponoj :

**1. Protekto de la naturo**

Multaj familioj emfazis: la arboj malaperas, la akvoj malpuriĝas, la klimato fariĝas danĝera. Ili diris, ke sen naturo ne estas vivo. Ili petis projektojn kiel: rearbigado, purigado de kvartaloj, protektado de fontoj, edukado pri medio.

2. **Aliro al edukado por infanoj**

La plimulto insistis pri edukado: *"Infanoj needukitaj havas neniun estontecon, infano sen lernejo povas facile erari, ni ne volas, ke niaj infanoj aliĝu al armitaj grupoj."* Ili petis: subtenon por lernejkotizoj, provizon de iloj (krajonoj, kajeroj), establon de malgranda infancentro.

**3. Grandaj projektoj utilaj ankaŭ al la asocio**

1. Projekto por malgrandaj komercoj, por ke familioj povu memstare enspezigi ion.
2. Centro por psikologia subteno, ĉar multaj homoj spertas traŭmaton.
3. Metiaj trejnadoj por junuloj kaj virinoj por doni realajn kapablojn.
4. Regula nutrado-subteno por plej kompatindaj familioj ne unufoja, sed laŭplana subteno.
5. Kreado de kultura kaj sporta centro por protekti junulojn kontraŭ malbonaj vojoj kaj perforto.

**4. Video-Raporto**

Nia videa raporto klare montras: la hejmojn, la realan nivelon de mizero, la distribuan laboron, la ĝojon kaj larmojn de la familioj, la disciplinon de nia teamo, la travideblecon de nia laboro. Ĝi estas valora atesto por la donacinto.

**Konkludo — Invito al la Mondo**

Krom distribuado, la 16-an de novembro 2025 markas lecionon de vivo, montras ekzemplon de amo kaj fenestron de espero. Ni montris, ke junuloj povas ŝanĝi la realon. Ni montris, ke paco ne estas nur teorio sed ankaŭ ago, decido, faro. Ni invitas: plenkreskulojn, junulojn, partnerojn, bonfarantojn, internaciajn organizaĵojn, aliĝi al nia movado kaj helpi nin fari nian asocion *PAMOJA HAKUNA MATATA* reala vivmaniero. Ni povas fari multe, ni povas ŝanĝi vivojn, ... sed nur kune.

**Dankesprimo**

Ni dankas: la 31 heroojn de nia teamo, la familiojn kiuj kuraĝis rakonti siajn historiojn, ĉiuj kiuj subtenis kaj plu subtenos nin, precipe DAMAKSO kaj Q. ERNESTO. Kune ni venkas, kune ni releviĝas, kune ni konstruas pacon. Tiu ĉi raporto estas ankaŭ en la germana, la angla kaj la franca.

***Niaj kontakt-adresoj :***
*Asocio : ETIMARKI PAMOJA HAKUNA MATATA*
Rete : pamojahakunamatatardc@gmail.com
*Vacape : +243 992764367, +243 976971837*

# Rondo Esperantista de Kiwanja

**Ndagijimana Justin – Rutshuru**

Rondo Esperantista de Kiwanja, REK, estis kreita en junio 2017 de Joel Muhire, kaj estas la unua forta klubo el la urbeto Kiwanja, sukcesinta enmovadigi multajn esperantistojn, fakte multaj el la membroj de REK jam estas individuaj membroj de UEA!

La urbeto Kiwanja situas en la teritorio Rutshuru (Ruĉuru), 80 kilometrojn norde Goma, Norda Kivuo (DR Kongo).

Joel Muhire kreis tiun klubon post plurjara penado varbi novulojn per montrado de esperantaĵoj, invitado al eklernado de Esperanto per lokaj radiostacioj de Kiwanja: RACOU FM, ALLIANCE FM, RACOVE FM, RTEDH FM. Li eĉ enkondukis Esperanto-programon en orfejon Njiwa, privata al la pastoro Ngango Muhima. La vorto ESPERANTO, danke al liaj klopodoj disvastigi tiun lingvon, ne plu estas nova ĉe multaj Rutshuru-anoj.

En 2021, REK havis projekton, filmoj en Esperanto. Ĝi sukcesis produkti filmon, ***kvazaŭ korpo sen koro***, spektebla en jutubo. Ĝi priskribas la malfacilajn vivkondiĉojn kiujn travivas orientkonga loĝantaro, pro la preskaŭ eternaj militaj konflikoj.  Ĝuste pro la milito kiu ŝiras la orientan parton de DR Kongo de pli ol trideko da jaroj, multaj membroj de REK fuĝis aliregionen, ankaŭ Joel Muhire fuĝis al Goma, la urbo kiun bedaŭrinde pli poste trafis la militaj skuoj.

Joel Muhire ne povis zorgi pri REK defore, kaj taskigis al Justin Ndagijimana, lia eks-lernanto zorgi pri ĝi kaj revigligi tiun klubon. Nuntempe REK ekfortas e-movade: ni havas novajn adeptojn, kaj feliĉe Françoise Noireau (el Francio) ne ĉesas kuraĝigi nin. Kvankam ankoraŭ regas malpaco en Rutshuru, REK staras neŝanceligeble kaj estonte, espereble el ĝi kreiĝos e-asocio. Ni sukcesis enkonduki Esperanton en elementan *lernejon SIFA*.

S-ro Justin reorganizis tiun klubon kaj starigis novan estraron:


**Prezidanto :** *Justin Ndagijimana*
**Kasisto :** *Djedidjah Bazimazike*
**Konsilistoj :** *Elie Muhima kaj Sagesse*.

Rondo Esperantista de Kiwanja organizas regulajn Esperanto-renkontiĝojn, en kiuj partoprenas la klubanoj kaj foje, eĉ lokaj ĵurnalistoj.



***Kvazaŭ korpo sen koro*** *estas jutube spektebla filmo de Rondo Esperantista de Kiwanja en du partoj, farita kunlabore kun la Kinoarta Klubo "La Patience" de Kiwanja, kun-instige  de Joel Muhire kaj Kambale Amani Love. Pri la projekto Afriko kaj filmoj en Esperanto legu en revuo Esperanto de UEA, Oktobro 2019 La filmo aperis la 7-an de novembro 2021, kaj ĝi spekteblas en du partoj ĉe:* https://youtu.be/fOgcD8eFXIE *kaj* https://youtu.be/qv0WUYENO2s
*La filmo prezentas ampleksan bildon pri konstanta malfacila vivo en la orienta parto de DR Kongo, ekster la pli kruelaj pertranĉilaj murdaj scenoj en Beni far ADF NALU.*
*Espero, la ĉef-rolulino, havis normalan vivon kaj ardan revon iĝi la plej bona kaj lerta atletino de sia generacio. Sed iam pro konfliktoj naskiĝintaj en ŝia loĝoloko rezulte de politikaj voĉdonadoj, ŝi kaj aliaj samaĝulinoj bedaŭrinde perforte forkaptiĝis. Dum ilia forkaptiteco, ili devis kontraŭvole servi en ribela grupo, Movado de Sentima Generacio, kie ili ĉiuj plurfoje estis seksperfortitaj kaj devigitaj murdi. Finfine danke al la klopodoj de la familio kaj kunlaboro inter pluraj personoj kaj publikaj instancoj, Espero kaj ŝiaj amikinoj liberiĝis…*

# UNIVERSAL INFINITY KNOWLODGE ASSOCIATION




**Malekera Cimanuka Bonne Idée – Uvira**

**UNIVERSAL INFINITY KNOWLODGE ASSOCIATION (UIKA)** estas asocio, strukturo, spaco por interŝanĝo kaj kunveno de pensoj, opinioj, hipotezoj kaj komentoj por ĉiuj, por solvi problemojn kiuj malhelpas la progreson de niaj socioj kaj komunumoj fariĝi tio, kion ili vere devus esti.

La ideo krei ĉi tiun asocion venis al ni en 2020, post pluraj naturaj katastrofoj, precipe inundoj, militoj, malamikecoj kaj interkomunumaj konfliktoj, kaŭzintaj milionojn kaj miliardojn da homaj, materiaj perdoj.

Mi, **Malekera Bonne Idée**, kiel fondinto, vizipensulo kaj kunordiganto de ĉi tiu iniciato, per miaj propraj okuloj vidis homojn morti, infanojn perdi siajn gepatrojn kaj komenci vagi sur la stratoj.

**Celoj**

Niaj celoj baziĝas sur problemoj de minaco, seksperforto, ignorado de la graveco de junularo, tribaj konfliktoj, malforta rezonkapablo, malvolviĝo, malamo, rasismo kaj ĉiuj defioj rilataj al ĉi tiuj, kiujn niaj socioj suferas.

1. Kontribui al la evoluo de socioj respektante kulturojn, regulojn kaj ritojn.
2. Agi kiel socia aganto laŭleĝe kaj juste poralvoki tion, kion socioj (individuoj) bezonas por sia florado.
3. Konstrui kaj unuigi diversajn sociojn kaj/aŭ komunumojn por socia kuneco, pa-

co, egaleco, kompreno, amo kaj libereco en larĝa senco.

4. Krei junularon fortan en espero por la estonteco de socioj kaj/aŭ komunumoj.
5. Legi, lerni, kompreni kaj agi libere sed saĝe.

**Niaj misioj**

1. Gvidi kaj helpi orfajn infanojn subtenante ilian lernejan edukadon per kontribuoj de ĉiuj membroj de la asocio.
2. Formi edukitan junularon por entrepreni, fariĝi memstara kaj kompreni sian grandegan kontribuon en niaj socioj.
3. Batali kontraŭ barbarismo per valorigo de edukado kaj organizado de diversaj trejnadoj (pri entreprenado, komercado, ktp).

**Niaj valoroj**

Valoroj estas elementoj kiuj difinas la vivmanieron de ĉiu komunumo kaj ĉiuj devas ilin respekti. Niaj valoroj estas: Lerni, Scii, Agi.

**Programo "unu piedo en la lernejo, unu piedo en la komerco"**

Multfoje, junuloj post siaj studoj suferas pro senlaboreco, fenomeno tre disvastiĝinta en multaj afrikaj landoj. Tio okazas ĉar iliaj diplomoj ne atestas pri iliaj studoj aŭ fakaj kapabloj, sed ĉar ili kredas ke la diplomo sufiĉas por ricevi laboron — kaj ĝuste tie ili restas blokitaj. Do, havi laboron aŭ esti dungita ne dependas de nia studnivelo, ĉar oni povas mem dungi sin. Sufiĉas transformi sian scion en praktikan kapablon.

Fakte, UIKA lanĉis ĉi tiun programon celantan la ĝeneralan publikon. UIKA ankaŭ profitis la okazon por inviti lernantojn de la humanaj sciencoj — po 30 el la antaŭlasta klasĉambro kaj po 30 el la lasta mezlerneja klasĉambro en ĉiu el niaj 10 celitaj lernejoj por partopreni. La programo baziĝas sur la jenaj celoj: *Krei liberan kaj entrepreneman mondon por junuloj,* trejnante ilin pri diversaj profesioj en la mondo, kiujn ni prezentas sub formo de profesiaj trejnadoj, nome:

*Lingvotrejnadoj:* Esperanto, Angla, Franca.

*Trejnado pri sapoproduktado:* De la preparfazo ĝis la konceptado de sapoj.

*Komputilaj trejnadoj:* Oficejaj aplikoj, programado.

*Trejnado pri desegnado kaj pentrado (farbado):* Pentrado de muroj, ktp

*Trejnado pri grafika dezajno:* Konceptado de emblemoj, afiŝoj, insignoj, kartoj, ktp

La avantaĝo de ĉi tiu programo estas ke ĉiuj trejnadoj estas tute senpagaj, sed postulas rapidan partoprenon de ĉiu, ĉar la lokoj estas limigitaj.

La programo kaj la trejnadoj daŭros 3 monatojn, de la 1-a de Decembro 2025 ĝis la 31-a de februaro 2026.

Aliĝis al nia programo pli ol 300 homoj de la publiko, kaj daŭre varbas junulojn, interesigas ilin pri nia programo de senpagaj trejndadoj.

**Kontaktoj**

Rete : uikainfo@gmail.com,
malekeracimanukabonneidee@gmail.com
Telefone : (+257) 69974752
Adreso : Q.KINAMA-GITEGA 7ème Rue No 33.

# TIMO

**Prime NSABIMANA – Rutshuru kaj Goma**

Ekzistas pluraj specoj de timo: la timo paroli publike, la timo rigardi personojn, la timo malsukcesi ion, la timo juĝi aliajn, la timo pri la onta tempo, la timo pri maljuneco, la timo lanci sin en novan aferon, la timo esti deĵetita, la timo pri malsano, la timo pri la morto; k.t.p. Ĉiuj ĉi tiuj timoj estas dividitaj en du: *raciaj timoj* kaj *malraciaj timoj.*

**LA RACIAJ TIMOJ.**

La raciaj timoj estas ekzemple timo kiel esti vorata de leono, la timo malsaniĝi k.t.p. Tiuj ĉi timoj estas fakte raciaj ĉar ili protektas homon kontraŭ multaj malbonaĵoj.

**2 LA MALRACIAJ TIMOJ**

Estas timoj kiel doni vidpunkton pri io, la timo pri kritikoj, la timo provi fari ion malfacilan, la timo malsucesi, k.t.p. Tiuj timoj estas danĝaraj pri la konekto de homo kaj sia konforto. Ili estas tre danĝeraj tiamaniere ke kiam la homo permesas ilin en sin, ili blindigas, senkuraĝigas, malfortigas, dubigas lin pri lia kapablo kaj kredigas al li mensogon pri si mem.
Ne ĉio. Ili mortigas liajn elanon, ambicion kaj revojn. Ekde tiam la homo komencas vivi mizeran kaj sensignifan vivon, kaj tiam multaj komencas pensi ke la naturo, cirkonstancoj, Satano kaj eĉ Dio estas kontraŭ ili.
Aliaj iras foren en la pensoj kaj diras al si mem ke ili venis en tiun ĉi mondon malbenitaj. Kaj ili vivas kredante malvere ke nenio povas esti farata por ŝanĝi ilian vivon.
Por vivi sian vivon plene, oni devas lerni kaj regi ĉian racian timon. La regado de tiu timo kondukas al multaj bonaĵoj.

*INTERNACIA LITERATURA E-KONKURSO*
*"HRISTO GOROV-HRIMA" – 2026*

*Georgi Mihalkov – Bulgario*

**"Hristo Gorov – Hrima"** estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. La Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.
La konkurso estos por eseo. La temo de la eseo estas:

***"MIA LA PLEJ BELA ESPERANTO-REMEMORO"***

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La verko estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton per supersignoj. La aŭtoroj indiku siansekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreson, telefonon kaj interretadreson. La eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman - 12 punktaj. **La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.**

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro2026 al Georgi Mihalkov, prezidanto de la ĵurio.

retadreso: *modest.mihalkov@gmail.com*.

Ĉiuj sukcesoj en scienco, en teknologio, en politiko, k.t.p. estas rezulto de la batalo kontraŭ la malracia timo. La nura antidoto kontraŭ la tirana malracia timo estas ago. Ni lernu agi nun malgraŭ la circontancoj. Kiam ni agas, kuraĝe, obstine, la malracia timo iom post iom malape-

ras kaj vojo al sukceso aperas! Sed kiam oni malsukcesas agi ĝustetempe pro timo, la timo grandiĝas kaj iĝas monstro. Ni venku niajn malraciajn timojn per agemo. Ni evitu hezitemon kaj dubemon ĉar ili nutras la malraciajn timojn kaj grandigas ilin!

# Zamenhofa tago




La 15an de decembro de ĉiu jaro, esperantistoj tra la tuta mondo tradicie memorfestas la naskiĝon de nia majstro Ludoviko Lazaro Zamenhof. En Rondo Familia, novuloj en la movado ekscias pri L.L Zamenhof, lia dezirego plibonigi la mondon, puŝinta lin krei nian neŭtralan lingvon Esperanto.

Jen malgranda memoraĵo pri la naskiĝtago de Ludoviko Lazaro Zamenhof, verkita de **Johano, el Suda Germanio.**

**Ho ve, mia naskiĝtago denove!**
*La 15a de decembro 1859*

Ĝuste antaŭ 166 jaroj mi naskiĝis kiel iom malforta knabo de juda familio en la vasta rusia imperio kaj mortis pro malforta koro kaj eble pro tro da fumado, bedaŭrinde tro frue en Varsovio post vivo de malĝojo kaj malfacileco. Tamen mia vivlonga klopodo por paco kaj interkompreno ŝajne ne estis tute vana, ĉu ne?
De frua aĝo mi revis kaj strebis krei universalan lingvon kiel komunikilon, kiu kunigus la diversajn homojn de la mondo en spirito de homa frateco. La rezultoj de miaj revoj kaj klopodoj fariĝis tio, kio hodiaŭ estas konata kiel ESPERANTO. Malgraŭ tio, ke la mondo ankoraŭ ne agnoskas ĝian veran valoron, plaĉas al mi vidi la belan frukton de mia laboro. Ekzistas nun vivanta internacia lingvo minoritata, iniciatita antaŭ pli ol unu jarcento kaj nun parolata kaj ŝatata tutmonde.

Gratulon Ludoviko!

## Poemo : Morto

Morto fakte estas ne timinda!
ĝi okazas laŭ regulo de l' granda Naturo!
de neniam al nun, al la senfina onteco
homojn chiujn nepre trafas la torturo!

Ĉu imponaj reĝoj, ĉu popolanoj,
ĉu altranguloj, ĉu simpuloj,
neniu povas sin meti en escepto!
tiel estas ankaŭ jen mi, kadukulo!

Juneco, oldeco, malsano kaj morto
estas dum homa vivo kvar sezonoj!
el mia vivo morto estas necesa parto,
per tio mia vivo obeas laŭ rezono!

Nun, miaj gefiloj havas sian familion,
miaj genepoj viglas pompe kiel floroj.
esperantoojn mi sendis al E-Muzeo,
kio malŝarĝis min de la tuta koro!

Mi kredas, iuj homoj longe vivas
en homa memoro pere de sia verko!
ĉi tio ja estas unika metodo espera!
Mi bezonas nur poemojn, for fiĉerko!

Ĉiu tago estas donaco de kara Dio,
kiun mi devas trasperti kun ĝojo!
se la fina momento venos al mi,
certe mi kun rideto iros al la vojo!

**Gajo, Yuanjiang,**

**Ĉinio.**



# Zamenhof-tage en Rutshuru

**Honoré Sebuhoro – Rutshuru**

Ni ĝojas denove festi la naskiĝdaton de Ludoviko Lazaro Zamenhof. La ceremonio komenciĝis je la 15-a kaj 10 minutoj per korusa kantado de La Espero.

## PRELEGO DE LA PREZIDANTO DE VSK

*Karaj eminentaj gastoj kaj membroj de la esperantlingva mondo, ni ĝojas bonvenigi kaj inviti vin partopreni en ĉi tiu feliĉa datrevena celebrado de L. L. Zamenhof, la fondinto de la lingvo Esperanto, lingvo kiu unuigas nin. Kompreneble, la fondinto alfrontis multajn malfacilaĵojn dum la kreado de ĉi tiu lingvo, sed li finfine sukcesis, kaj nuntempe ĝi estas agnoskita de UN kaj UNESKO. Esperanto riĉiĝis, daŭre riĉiĝas, kaj fariĝas pli nuancita.*

*Esperanto, neŭtrala internacia estis publikigita ofiaciale en 1887 de D-ro L.L. Zamenhof.*

*Zamenhof konsideris, ke neŭtrala lingvo, apartenanta al la tuta homaro, ne nur estus praktika komunikilo, sed ankaŭ kontribuus al redukto de konfliktoj kaj antaŭenigo de paco.*

*Esperanto jam atingis gravan rezulton: ĝi fariĝis vivanta, intergeneracia lingvo kaj estas parolata de miloj da homoj tutmonde.*

*La internacia uzo de limigita nombro da lingvoj distordas kulturan interŝanĝon kaj distordas la fluon de informoj favore al la politikaj, ekonomiaj kaj ideologiaj elitoj de lingve privilegiitaj landoj.*

*La uzo de neŭtrala kaj pli facile lernebla lingvo povus parte restarigi ekvilibron kaj justecon.*

*Esperanto estas egaleca ĉar ĝi permesas al grandaj segmentoj de la loĝantaro en malsamaj landoj komuniki rekte, transcendante lingvajn kaj politikajn barojn. Lerni Esperanton daŭras ĉirkaŭ trionon de la tempo bezonata por lerni la anglan aŭ la germanan.*



*Indas rimarki, ke Esperanto estis agnoskita de UNESKO en 1954 kiel nedeviga lingvo, agnoskante kelkajn el la atingoj de la organizo en internacia interŝanĝo kaj kunigado de la homoj.*



*L.L. Zamenhof konsideris Esperanton kiel neŭtralan lingvon, ĉar ĝi apartenas al ĉiuj homoj de malsamaj naciecoj kaj rasoj. Ĝi ne nur estus praktika ilo, sed ankaŭ kontribuus al konfliktoredukto kaj antaŭenigo de paco.*

*Fine, nia celo estas mobilizi kaj konsciigi pri ĝi intelektajn junulojn, plenkreskulojn, inkluzive de virinoj, ĉar sekso ludas gravan rolon en la komunumo.*

*Dankon ke vi aliĝis al nia Esperanta komunumo! Bonvenon!*

# MIA VIZITO AL ĈEĤIO




**Kokou SAGBADJELOU – Togolando**

Kiel aliaj geesperantistoj en la mondo, mi vojaĝis al tiu lando ĉi-jare kadre de la *110-a Universala Kongreso de Esperanto (UK)*, kiu okazis en Brno (dua plej granda urbo de Ĉeĥio) de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2025. Inter milo da partoprenantoj, afrikanoj estis tre minoritataj. Apenaŭ 6 da ili povis reprezenti Afrikon. Iuj eble ŝatus de-mandi, ĉu mankis la volo de afrikaj esperantis-toj esti ĉe la tutmonda rendevuo. Mi povus tuj aserti, ke NE. La emo ĉiam estis kaj estas, sed apud ĝi staras obstakloj pri la vojaĝo : sin pre-paro, flugbileto, asekuro, vizo, restado en la kongreslando apartenanta al *Schengen areo* kaj tiel plu. Ĉio rilatas al ne kapableco de afrikanoj memfinanci siajn aferojn proprajn. La plej grava, blokiga ''fenomeno'' estas la vizo. Eĉ se oni disponas sufiĉegan monon por certigi la vojaĝon, la vizo estas la lasta baro, kiun oni serioze alfrontu. Ĝi ne estas facile akirebla. El multaj afrikanoj, kiuj deponis siajn petdosie-rojn por la vizo, nur malmultaj sukcesis havi favoran sekvon. Miaflanke, mi vojaĝis al Accra (Ganao), kie troviĝas Ĉeĥa ambasadejo. Mi prezentis devigajn dokumentojn, pruvojn poste estis intervjuita. Terure. Mi estis bonŝanca. Finfine mi ricevis la vizon.

Unu semajnon antaŭ la malfermo de la UK, mi atingis la kongreslandon per buso de la flug-haveno vienaal Brno. Ĉe la busstacio, kie haltis



la buso veturiginta min, atendis malnova amiko nome sinjoro Miroslav Malovec kun karesnomo ”Mirek”. Li brakume akceptis min kaj rideto aperis sur niaj lipoj kaj vizaĝoj. Kelkajn minutojn poste ni ekiris per tramo al lia loĝdomo, kie mi ĉefe gastadis. Antaŭ tio, ni pasis en Lian laborejon. Tie, Mirek prezentis min al sia kolego Ĝentila, kiun mi salutis.



La E-muzeo en Svitavy

En la unuaj tagoj, mi konatiĝis kun la urbo : promenis, ekskursis kun Mirek. Mi elprofitis tiun antaŭ kongresan periodon por retrovi post 26 jaroj la urbon ”Svitavy”. Je la invito de s-ino Libuše Dvoráková, respondeculino de la Esperanto-muzeo en tiu urbo, mi iris tien trajne la 22-an de julio 2025. Mi vizitis la muzeon, renkontis esperantistojn de la loka klubo, ekskursetis kaj malkovris interesaĵojn. Ni babilis, kunmanĝis kaj fotis.

Venis la kongresaj tagoj. De la malfermiĝis la ferma ceremonio de la kongreso multaj programeroj sukcese okazis. Mi elektis el ili miajn preferatajn kaj ĝojis pri ili. La etoso inter la praktikantoj de la lingvo estis pli ol amikeca. Nur la disiĝo estis ĉe la fino korstreĉiga. Ĝojo kun emocioj trafis ĉiujn novajn kaj malnovajnpartoprenantojn. Mi trovis sukcesa kaj bona la kongreson dank'al aktivaj organizantoj, LKK-anoj, helpantoj, kiujn indas gratuli.

Pliajn tagojn mi pasigis en Ĉeĥio post la kongreso, kio etendi gis mian restadon al aliajurb(et)oj. Alia pertrajna vojaĝo ebligis al mi gasti en ”Světlánad Sázavou” de la 5-a ĝis la 7-a de aŭgusto 2025 ĉela familio de gesinjoroj CHVÁTALOVÁ (ne-esperantistoj), kies filinoj ”Vladmira” kaj ”Dagmar” flue parolas Esperanton. Ambaŭ samideaninojn mi antaŭ jarojn konis.
Mia restado en Ĉeĥio kulminis per la vizito al **S**omera **E**speranto-**T**endaro (SET) en ”Lančov” (08-10/08/2025), kie renkontiĝis eksaj tendaranoj por diskuti pri siaj aferoj. La kunveturadon al tiu loko kaj reorganizis Mirek kaj ties amikoj. Ni estis kvar en aŭto de unu el la amikoj kaj veturis. Dum la kunesto en la SET-aranĝejo, okazis ekskursoj ĉu grupaj ĉu unuopaj. Kelkaj partoprenantoj trovis necesa la gimnastikon por la sano, tial, ili praktikis ĝin ĉiumatene. En la vespero de la du unuaj tagoj, post la kunmanĝoj, ĉiuj tendaranoj sidis ĉirkaŭ la eventa fajro el ligno por aŭskulti interesajn rakontojn, enigmojn kaj ĝui bel-melodiajn kantojn/muzikojn, kiujn agrabligis du veteranoj per siaj gitaroj.

Ĉe la fino de la aranĝo, ni reiris al Brno. La postan tagon mi forlasis ĝin por reflugi aviadile al mia lando. Ĉio de mia eksterafrika vojaĝo ĉijara restas memorinda.

Ĉi-jare la kongreso okazos en Graz (de la 1a ĝis la 8a de Aŭgusto 2026), se vi ankoraŭ ne aliĝis, rapidu : https://uk.esperanto.net, https://uea.org/kongresoj.

# Averto al esperantistinoj

***Mi petas vin dissendi ĉi tiun mesaĝon por protekti aliajn esperantistinojn kontraŭ misuzo de nia komuna lingvo. Esperantistino el Afriko konfidis al mi sian tre doloran sperton. Ŝi ne havas la forton por publike raporti pri tio, sed ŝi permesis, ke mi rakontu ŝian historion nome de ŝi, por ke aliaj ne suferu same. – F. Noireau.***

Ŝi rakontas:

“Mi estas la sola aktiva esperantistino en mia regiono, do ĉiuj kiuj vojaĝas al mia lando, kontaktas min. Mi rekontaktiĝis kun pola esperantisto, kiun mi konis jam de kvin jaroj. Li proponis amrilaton, kaj mi kredis je lia sincereco. Li venis, metis ringon sur mian fingron kaj promesis geedziĝon. Sed poste mi rimarkis, ke li uzis min. Li rifuzis loĝi en hotelo kaj restis en mia hejmo, sen pagi eĉ unu moneron. Mi pagis por manĝaĵoj, transporto, interreto — ĉion. Kiam li finis siajn aferojn, li subite ŝanĝiĝis, forlasis min, kaj poste eĉ mensoge akuzis min pri aferoj, kiuj neniam okazis. Tio estas jam la dua fojo, ke mi estas trompita de esperantisto. Mi sentas min profunde vundita kaj humiligita. Mi ne plu certas, ĉu mi volas resti en la Esperanta komunumo.”

***Noto de la redakcio :*** Notinde, ne ĉiuj esperantistoj misuzas nian lingvon tiamaniere. Ekzistas pluraj esperantistoj kiuj havas veran, eĉ elkoran amrilaton kun eksterlandaj kunul(in)oj. Tiu supra rakonto tamen estas escepto prezentanta malbonan bildon pri nia movado. Tia mabona konduto de kelkaj esperantistoj povas malutili al nia lingvo kaj eĉ igi veraj esperantistojn kabei !

## Halt’ al misuzo de Esperanto !




Kara leganto,

Ĉu vi estas kongolandano? Se jes, bone. Kunhelpu do florigi la e-movadon en DR Kongo partoprenante en poresperantaj klubaj aŭ asociaj agadoj, kaj ne forgesu raporti pri tio !
Viaj spertoj povas sendube avantaĝi al aliaj por pli energie aktivi en la movado.

Ni tre ŝatus ankaŭ legi de niaj eksterlandaj legantoj.

**Redakcio.**

# Pri la muzikisto Chris Freddy

Chris Freddy, juna esperantisto el Goma, Kongo Kinŝasa, pro pasio pri muziko, en la jaro 2022, kiam li estis ankoraŭ komencanto ekkantis en Esperanto. Li skribis sian unuan kanton Esperante, *la amikoj*, en kiu li prezentis gravan mesaĝon pri la komunumo. Multege da homoj ŝatis la kanton kaj tio kuraĝigis s-anon Chris Freddy daŭrigi kantadon en Esperanto, tamen kiel komencanto li trovis ke ne estis facile. Tio cetere, igis lin pli kaj pli entuziasmiĝi pri Esperanto kaj ellerni ĝin en la klubo Goma Esperanto Klubo, GEK, en kiu li kuraĝe ĉeestis kurson. En la 109a UK okazinta en Aruŝo, en 2024 kune kun Joel Muhire kaj Miriam Ingabire koncertis antaŭ kelkdeko da esperantistoj.




Nuntempe Chris Freddy kreas belajn kantojn, atente aŭskultas kelkajn albumojn de samideanoj kiel *jOmO, Joel Muhire, Moses Byamungu, Knelcy ktp*. Chris Freddy havas muzikan projekton, kaj ĝuas apogon de kelkaj amikoj kiel *Marcelin Luheka, Jean kikako*, … Antaŭ nelonge li kunlaboris kun *Vinilkosmo(www.vinilkosmo.com)* por ke lia muziko tuŝu multajn homojn en esperantujo. Tiu kunlaboro faciligis lian laboron kaj dankas s-anojn *Miguel, Flo, kaj Aleks Kadar*. La albumo jam disponeblas ĉie en diversaj Ciferecaj platformoj de Vinilkosmo.



Ĝuu unu el liaj kantoj :

https://youtu.be/qyk1pw-7rOA?si=M082SO7pOQz2HPeb

Nuntempe Chris Freddy skribas la duan albumon kaj petas pri via subteno, kiu sendube signifas multe por li.

Interesiĝantoj kontaktu lin je : chrisfreddy52@gmail.com,
aŭ per vacapo : +243995482662.

Krom Esperanto, li kantas sŭahilajn kantojn.
Multo el lia kantaro spekeblas en lia jutuba kanalo:
https://youtu.be/RLwBhxWjXr8?si=qiVXPEdV1xFnjtkn

Ke vivu Esperanto-muziko !

# SOLIDARECO MILITTEMPE

## UEA vokas al subteno por esperantistoj en d. r. kongo tra la konto Espero

**El la Gazetaraj Komunikoj de UEA**

Universala Esperanto-Asocio (UEA) per sia **Konto Espero** daŭrigas solidaran agadon por subteni individuajn membrojn de la Asocio, kiuj troviĝas en la plej bezonataj situacioj pro armitaj konfliktoj kaj humanitaraj krizoj.

Donacu al la Konto Espero:
https://uea.org/alighoj/donacoj/espero


Pere de zorge kolektitaj informoj ekde marto 2025, jam eblis helpi ĉirkaŭ **28 individuajn membrojn de UEA** en **Demokratia Respubliko Kongo**, ĉefe en la urboj **Goma** kaj **Bukavu**, regionoj forte trafitaj de perforto kaj malstabileco. Al tiuj helpitoj UEA sukcesis sendi **monhelpon de po 100 eŭroj**.
En regiono, kie granda parto de la loĝantaro vivas sen stabila formala enspezo kaj kie multaj familioj devas kontentiĝi per tre limigitaj rimedoj, tia sumo povas havi **realan kaj tujan efikon**: por multaj ĝi signifas subtenon por bazaj bezonoj dum **unu aŭ eĉ du monatoj**, ekzemple por manĝaĵoj, loĝkostoj, sanelspezoj aŭ edukaj bezonoj. En kondiĉoj de milito kaj delokiĝo, tiu helpo ofte estas decida por travivi malfacilan periodon kun minimuma digno.
UEA nun celas **etendi tiun solidaran helpon** al ankoraŭ aliaj individuaj membroj, kiuj daŭre suferas pro militoj kaj perfortaj konfliktoj en diversaj regionoj de la mondo. Tial la Asocio alvokas la tutmondan Esperanto-komunumon kaj aliajn homojn de bona volo kontribui al la **Konto Espero**, por ke neniu membro restu sola fronte al tiaj malfacilaj provoj.
Tiu solidareca alvoko estos akompanata de speciala kultura gesto: en la jutuba kanalo de UEA aperas muzikvideo de la kanto **"Milittempe"**, interpretata de **Joel Muhire** kaj **Miriam Ingabire Alliance**, esperantistaj kantistoj el D. R. Kongo – https://www.youtube.com/watch?v=_NgEKa8Ihcc. La kanto premieriĝis dum la malfermo de la 6-a Virtuala Kongreso de Esperanto kaj nun estas prezentata aparte – kiel necesa voĉo de espero, eltenemo, homa proksimeco kaj konfirmo de niaj valoroj en tempo de sufero.
Per tiu iniciato UEA volas memorigi, ke Esperanto ne estas nur lingvo, sed ankaŭ **komunumo de reciproka zorgo**. En la strategia plano de UEA por la periodo 2025-2030, nome AKIRI, solidareco estas unu el la referencaj valoroj. Eĉ kiam la helpo estas modesta laŭ ciferoj, ĝi povas esti **profunde esperodona gesto** por tiuj, kiuj sentas sin forgesitaj de la mondo. Do ĉiuj donacoj gravaj. Se donacoj alvenos abunde, ankaŭ eblos pensi agadojn krom la referenca helpo de po 100 EUR por helpito.
Kiel same jam memorigis nin Joel Muhire:
*UEA estas nia, UEA estas vi* :
https://youtu.be/B5TB6P_ka5M?si=PĈptFGeHqbDX_VA.
Kune ni povas mildigi maljustaĵojn kaj konservi esperon – en milittempoj ni devas eĉ pli konfirmi nian forton, kio en la aktivismo de la Esperanto-movado ĉefe estas **la forto de espero**.

# LINGVOJ EN DR KONGO

**Joel Muhire – Goma**

*Kio estas lingvo ?*
La lingvo en pli vasta senco estas ĉiu sistemo de abstraktaj signoj per kiu vivaĵo transdonas informojn al vivaĵo. Lingvo estas ankaŭ sistemo de malmultaj signoj per kiuj homo komunikas kun hundo aŭ kato, tiu minimuma signaro inter novnaskito kaj patrino kiam ĝia nura lingvo estas ridi por montri sian kontenton kaj plori por montri sian malkontenton. **El vikipedio.**

**Lingvoj en DR Kongo**




*El vikipedio*

Geografie, DR Kongo estas ĉirkaŭata de 9 landoj, oriente: Ugando, Rŭando, Burundo kaj Tanzanio, sude: Zambio kaj Angolo, okcidente: Kongo Braza-urbo, norde: Respubliko Centrafrika kaj Suda Sudano. La loĝantoj el la landlimaj regionoj kutime praktiktas lingvojn de regionoj en la najbaraj landoj kaj inverse.
En DR Kongo la lingva diverseco estas laŭ la varieco de la etnaj grupoj. En DR Kongo estas parolataj pli ol 450 lingvoj kaj dialektoj, aldone la franca estas oficiala lingvo pro la kolonia pasinteco, uzata en la ŝtataj instancoj, lernejoj, ...

Cetere ekzistas kvar oficialaj naciaj lingvoj DR Kongo:
***Lingala, Konga, Luba*** kaj Konga varianto de ***la sŭahila***. Tiuj lingvoj estis oficialigitaj dum la belga koloniigo por malpliigi la nombron da lingvoj. La konga aŭ *kikongo* estis la lingvo de la antaŭa Konga reĝlando. Ĝi estas parolata ankaŭ en la najbaraj landoj : *Kongo Brazavila* kaj *Angolo*. La luba estas parolata precipe en la orientaj provincoj okcidenta kaj orienta Kasai. La lingala estis origine la lingvo de la etno de Bangalo. Ekde la regiono/provinco Ekvadoro (Équateur) ĝi disvastiĝis laŭlonge de la riverego Kongo. Dum sia regado, la prezidinto de la tiama Zairio, Mobutu uzis ĝin en la amaskomunikiloj kaj nuntempe ĝi estas uzata en popmuziko. La lingala iĝis oficiala lingvo de la armeo kaj pro tio ĝi disvastiĝis tra la tuta lando.
La sŭahila estas uzata kiel ponta lingva en la tuta orienta Afriko kaj ankaŭ en oriento de la Demokratia Respubliko Kongo.

*Lingvoj*
**Joel Muhire**

# Leciono pri la Sŭahila lingvo

## SUBJEKTAJ PRONOMOJ

En la sŭahila, la subjektaj pronomoj havas la apartecon esti ĉiam aligitaj al la verbo kiel prefiksoj.

En la 3-a singulara kaj plurala persono, ekzistas neniu anstataŭaĵo inter la subjekta substantivo kaj la subjekta prefikso, sed komplementeco: la subjekta prefikso estas tie, eĉ kiam la subjekta substantivo jam estas esprimita en la frazo.

### 1. AFIRMAJ SUBJEKTAJ PREFIKSOJ:

| KLASOJ | singularo | Ekvivalento | Pluralo | Ekvivalento |
|---|---|---|---|---|
| **1** | Ni- | = mi | Tu- | = ni |
| **2** | U- | =vi | M- | = vi |
| **Klaso M-/WA- (Kl 1 / 2) 3** | A- | = li/ ŝi/ ĝi | Wa- | = ili |
| **Klaso M-/MI (Kl 3 / 4)** | U- | = li/ ŝi/ ĝi | I- | = ili |
| **Klaso JI-/MA- (Kl 5 / 6)** | LI- | = li/ ŝi/ ĝi | YA- | = ili |
| **Klaso KI-/VI- (Kl 7 / 8)** | KI- | = li/ ŝi/ ĝi | VI- | = ili |
| **Klaso N- (Kl 9 / 10)** | I- | = li/ ŝi/ ĝi | ZI- | = ili |
| **Klaso U- (Kl 11/14)** | U- | = li/ ŝi/ ĝi | | |
| **Klaso KU- (Kl 15)** | KU- | = li/ ŝi/ ĝi | | |
| **Lokativaj klasoj** | PA-, KU- aŭ M- | = li/ ŝi/ ĝi | | |

**Komento: kl = klaso.**

Nur la Klaso M-/WA- (Klasoj 1/2) havas subjektajn prefiksojn por la 1a kaj 2a personoj de la singularo kaj la 1a kaj 2a personoj de la pluralo. En la 3a persono singulara (li/ŝi/ĝi) kaj en la 3a persono plurala (ili), la elekto de subjekta prefikso dependas de la substantiva klaso, al kiu apartenas la responda subjekta substantivo.

Tamen, kiam la subjekta substantivo reprezentas homon, kia ajn estas lia/ŝia sekso, ni uzos la subjektan prefikson de la Klaso 1 en singularo kaj Klaso 2 en pluralo, kiel por klasaj substantivoj M-/WA-.

**EKZEMPLOJ:**

| | | |
|---|---|---|
| **A**nafika | Li/ŝi alvenas | (klaso 1) |
| **Mama a**nafika | la Panjo (ŝi) alvenas | (Klaso 9 -> 1) |
| **Wa**melala | Ili dormas | (Klaso 2) |
| **Watoto wa**melala | La infanoj (ili) dormas | (Klaso 2) |
| **A**mekufa | Li/ŝi mortis | (klaso 1) |

| | | |
|---|---|---|
| **Mgonjwa a**mekufa | La malsanulo mortis | (klaso 1) |
| **Mbwa a**mekufa | La hundo (ĝi) mortis | (Klaso 9 -> 1) |
| **I**nafaa | Ĝi taŭgas | (Klaso 9) |
| **Nguo i**nafaa | La vesto (ĝi) taŭgas | (Klaso 9) |
| **Zi**nafaa | Ili taŭgas | (Klaso 10) |
| **Nguo zi**nafaa | Vestaĵoj taŭgas | (klaso 10) |
| **Li**nakwenda | Ĝi foriras | (Klaso 5) |
| **Basi li**nakwenda | La buso (ĝi) foriras | (Klaso 5) |

## 2. NEGATIVAJ SUBJEKTAJ PREFIKSOJ:

Tiuj rezultas el la kombinaĵo de la negativa pra-prefikso **HA-** kaj la subjekta prefikso, escepte de la unua persono singulara **(SI-)** kaj 2a persono singulara **(HU- anstataŭ HAU-).** Do:

| KLASOJ | singularo | Ekvivalento | Pluralo | Ekvivalento |
|---|---|---|---|---|
| **1**<br>**2**<br>**Klaso M-/WA- (Kl 1 / 2) 3** | Si-<br>Hu-<br>Ha- | = mi ne<br>=vi ne<br>= li/ ŝi/ ĝi ne | HATU-<br>HAM-<br>HAWA- | = ni ne<br>= vi ne<br>= ili ne |
| **Klaso M-/MI (Kl 3 / 4)** | Hau- | = li/ ŝi/ ĝi ne | Hai- | = ili ne |
| **Klaso JI-/MA- (Kl 5 / 6)** | Hali- | = li/ ŝi/ ĝi ne | Haya- | = ili ne |
| **Klaso KI-/VI- (Kl 7 / 8)** | Haki- | = li/ ŝi/ ĝi ne | Havi- | = ili ne |
| **Klaso N- (Kl 9 / 10)** | Hai- | = li/ ŝi/ ĝi ne | Hazi- | = ili ne |
| **Klaso U- (Kl 11/14)** | Hau- | = li/ ŝi/ ĝi ne | | |
| **Klaso KU- (Kl 15)** | Haku- | = li/ ŝi/ ĝi ne | | |
| **Lokativaj klasoj** | HAPA-,<br>HAKU- aŭ<br>HAM- | = li/ ŝi/ ĝi ne | | |

**EKZEMPLOJ:**

| | | |
|---|---|---|
| **Si**jui | Mi **ne** scias | (klaso 1 |
| **Ha**jui | Li/ŝi **ne** scias | (klaso 1) |
| **Joel ha**jui | Joel (li) **ne** scias | (klaso 1) |
| **Hawa**fanyi kazi | Ili **ne** laboras | (Klaso 2) |
| **Watu wale ha**wafanyi kazi | Tiuj homoj (ili) **ne** laboras | (Klaso 8 -> 2) |
| **Hawa**somi | Ili **ne** studas | (Klaso 2) |
| **Wanafunzi hawa**somi | La studentoj **ne** studas | (Klaso 2) |
| **Ha**kuna kazi | **Ne** estas laboro | (Lokativaj klasoj) |
| **Ham**na shida | **Ne** estas problemo | (Lokativaj klasoj) |



# ESPERANTO

**Esperanto** estas admirinda lingvo, kun signifa parol-komunumo en pli ol 130 landoj tra la mondo. Ĝia unike logika kunmeto el elementoj estas kombinita kun forigo de tiuj lingvaj komplikaĵoj, kiuj ne kontribuas al la komunika riĉeco de la lingvo. Tiuj faktoroj liveras lingvon inter 5- kaj 10-foje pli efike lernebla ol tradiciaj etnaj lingvoj. Tia lingvo unike taŭgas por internacia uzo.

**Esperanto** estas lingvo kun sia propra kulturo, kreita tra 130 jaroj de ĝia engaĝita parolkomunumo. Okazis kaj pluokazas centoj da renkontiĝoj tra la mondo – loke, regione, lande, kontinente kaj monde. Plie, ĝi estas valora ponto inter naciaj kulturoj, precipe tiuj de malpli parolataj lingvoj. La celo estas subteni tiujn lingvojn kaj kreskigi la lingvan kaj kulturan riĉecon de nia mondo.

**Esperanto** estas justa lingvo, ĉar ĝi estas je dispono de ĉiu – ne nur de tiuj kun la rimedoj, kontaktoj kaj tempo por lernadi etnajn lingvojn. Ĝi lokas homojn sur egalecan bazon kaj donas al ĉiu la rajton de transnacia komunikado.

**Esperanto** estas lingvo, kiu malfermas la mondon al la lernantoj kaj parolantoj. Multaj parolantoj havas bazan kaj firman kredon je internacia harmonio kaj toleremo de kulturaj diferencoj.

**Esperanto** – resume: admirinda, kulturpera kaj justa lingvo kaj universala lingvo.

**Universala Esperanto-Asocio**

**en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko**

# AL NIA LINGVO

Vi, bela lingvo Esperanto,
en mi la penso jam ne mutas;
parolas sentoj en la kanto,
per kiu mi vin nun salutas.

Ho kie estas via lando?
demandas homoj. La respondo:
La lingvoland' de Esperanto
jam estas nia tuta mondo!

Al tuta mondo vi apartenas,
al alto levas vi la homon,
kaj kiu vin en koro tenas,
de vi ricevas belon, bonon.

En homan mondon venas amo
per nova sento, kor-muziko;
vi faras pacon el malamo,
kaj fraton el malamiko.

Vi donas al mi, Esperanto,
kulturon novan kaj laboron...
sed kion donu mi, lernanto?
Akceptu mian tutan koron!

**Julio Baghy (El la Verda Koro)**